



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 5 1973	ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO REDAKTORO: HANS AMUND ROSBACH	3-a periodo 40 a (49a) jaro DUMONATA
----------------	--	--

Pensoj pri la diskutoj dum la 43-a Norvega Kongreso

Hejmenveninte mi iomete pripensis la diskutojn tie. Kiel oni scias el la oficiala raporto, la aranĝo mem tre bone sukcesis dank' al la lertaj preparoj de la loka klubo en Haugesund. Kun 60 partoprenantoj el 10 urboj aŭ lokoj, oni ankaŭ havis sufiĉan grandecon de la kongreso, kaj ni ĉiuj tre bonfartis.

La oficialaj diskuttemoj estis:

- Varbado de kursanoj.
- Eksterlandaj kursgvidantoj.
- Edukado de norvega kursgvidantoj
- Membrigo kaj konservado de novuloj.

Tio estas logika kombino de agadoj, komencante de la diversaj metodoj varbi novajn adeptojn tra elekto de taŭgaj kursgvidantoj al la fina membrigado de la novuloj.

C. Støp-Bowitz enkondukis la opajn punktojn, kaj la diskutojn vigle partoprenis kelkaj de la kongresanoj, kaj oni fakte konstatis, ke ekzistas diversaj opinioj pri la problemoj. Tio baziĝas evidente sur lokaj cirkonstancoj, precipe manko de taŭgaj kursgvidantoj ĉar la lertaj esperantistoj jam estas tro ŝarĝitaj.

Malbona ekonomio malhelpas grandan reklamon pri la kursoj kaj dungadon de profesiaj kursgvidantoj.

Rilate la konservado de novaj klubanoj, montriĝis diversaj opinioj, sed ĉiuj konsentis, ke tio estas grava kaj malfacila problemo por preskaŭ ĉiuj kluboj. -

Se oni provu substreki kelkajn eldirojn dum tiuj 4 diskuttemoj, mi povas substreki jenajn: Malgraŭ malfacilaĵoj ekzistas eblecoj aranĝi kursojn aŭ studrondojn se oni eluzas rimedojn kiel lokajn gazetojn (intervjuo pri la kurso kun ĝenerala priskribo de Esperanto), afiŝojn en vendejoj, prelego senpaga kun provleciono, fenestra ekspozicio kun sciigo pri la aranĝota kurso k.t.p.

Se oni ne kaptas sufiĉe da partoprenantoj al ĝeneralpublika kurso, oni povas aranĝi specialajn kursojn aŭ eble pli bone studrondojn por samspecaj grupoj kiel lernantoj, studentoj, skoltoj, mastrinoj, ĉi-specaj klubmembroj, sportistoj, rotarianoj k.t.p.

Eĉ rektaj membroj de NEL povus tion aranĝi en sia loko, kaj mi tre rekomendas tion provi. -

Lastjare montriĝis kreskanta intereso pri Esperanto, precipe inter la junularo. Tion pruvas la multaj leteroj al NEL, kaj la plimulto fakte aĉetas korespondkurson aŭ lernolibrojn.

NEL sendas al la kluboj la adresojn de tiuj interesitoj, kaj eble oni povus etendi tion ankaŭ al la rektaj membroj, por ke ili povu kontakti la studemulojn. -

Oni ne devas esti sperta esperantisto por gvidi studrondon. Se oni kapablas korekte prononci, oni pere de lernolibro aŭ korespondaj kursoleteroj povus gvidi ĝin.

Pri konservado de novaj klubanoj oni prave montris al la fakto, ke tiuj kiuj profunde lernis Esperanton, kutime restas en la klubo. Tial gravas, ke novuloj tuj partoprenas en daŭriga kurso aŭ en studrondo en la klubo mem.

La klubo en Oslo praktikas ambaŭ metodojn; unu horo antaŭ ĉiu kunveno okazas studrondo. Sed nur kiam oni kaptas "La internan Ideon", oni havas garantion resti dumviva esperantisto. Oni ankaŭ montris al "lingva kvaronhoro" dum kunvenoj.

Mi jam diris, ke kelkaj partoprenis la diskutojn, kaj mi iomete seniluziigis, ke ne pluraj partoprenis la debaton. La kaŭzo ne povas esti timo paroli Esperanton, ĉar la debatantoj uzis Esperanton aŭ norvegan laŭplaĉe; tute korekte. Tiamaniere oni povas aŭskulti kaj lerni, sed samtempe rajti paroli norveglingve.

Dum la lasta punkto de la tagordo, eventualaĵoj, "malligiĝis la lango" kaj tre multaj debatantoj sin anoncis. Kaj feliĉe aperis novaj vidpunktoj:

1. Arne Gram rekomendis al nia movado partopreni en agado kontraŭ malpurigado de la naturo.

2. Sonja Jørgensen rekomendis ĉiutagajn gutojn en la gazetaro. La ĝen.sekr. montris al la 3-liniaj anoncetoj kiujn iam havis NEL.


3. Berggreen donis superrigardon pri la nova situacio inter skoltoj post rekono flanke de la direktoro de Monda Skoltoficejo, d-ro Nagy, kaj menciis la preparojn por la ĵamboreo en Lillehammer 1975.

4. Oni diskutis la eblecon fondi novajn klubojn kaj montris al nova klubo en Skien kaj kurso en Tønsberg, ambaŭloke post prelegoj de liga-estraranoj.

5. Elna Matland ricevis gratulojn pro bona laboro pri Gazetara Servo, kaj Thor Magnus Carlsen pro siaj lertaj intervjuoj en Oslogazetoj.

6. Oni decidis sendi admonon al Norsk Rikskringkasting pri televida kurso laŭ modelo de la nederlanda Teleac.

7. Pri la debato pri 3 rezolucioj pri Internaciaj Organizaĵoj (propono de J. Matland), pri skoltoj (de Berggreen), kaj pri Kineaj Tekstoj (R. Bugge Paulsen) mi montris al la oficiala raporto.



Johu Berggreen
Trygve Müller 75-jara.

La 24an de Septembro Trygve Müller, Jørpeland, festis sian 75-jaran jubileon. Li estas fondinto

kaj prezidanto de la Esperanto-klubeto Pacaj Batalantoj en Jørpeland, kaj la unua norvego, kiu sukcesis akiri decidon pri Esperanto-strato, ĉe kiu li mem loĝas. Cetere li estas senĉese aktiva en la gazetaro kaj en la loka radio. Sinceran gratulon!

C.S.-B.

Studenta Esperanto-Societo dum la printempo aranĝis studrondon, 3 konversaciajn kunvenojn, kaj viziton al la Universitata Biblioteko sub gvidado de T. Arbo Hæg, kiu ankaŭ rakontis pri la Esperanto-libroj en la biblioteko. Al la manuskript-serio alvenis la du unuaj kontribuajoj (de C. Step-Bowitz kaj Olav Reiersøl). La katalogon pri interlingvistika literaturo en la U.B. T. Arbo Hæg preskaŭ finpretigis. La enketon pri la lingvaj problemoj oni dissendis en la Agrikultura Universitato en As. Ĝenerala kunveno okazis la 20an de Septembro. La nova estraro konsistas el prez.: Nils Chr. Stenseth, vicprez.: Arne W. Aasland, sekr.: Olav Hæg, kas.: Erling Killingbergtra, estrarano: Harald Step-Bowitz. Oni decidis aranĝi informkunvenon pri la Esperanto-movado por la membroj.

C.S.-B.

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

PROVIZORA REDAKCIO:

Hans Amund Rosbach,
Johan Hammond Rosbach.

ADRESO DE LA REDAKCIO:

Nergt. 37c, 6500 Kristiansund
Lindato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.

ABONPREZO: En Norvegujo kaj eksterlando: n.kr. 12.-

ANONCPREZOJ: $\frac{1}{4}$ paĝo kr 150.-,
 $\frac{1}{2}$ p. kr 75.-, $\frac{3}{4}$ p. kr 40.-,
 $\frac{1}{8}$ p. kr 20.-.

Redaktoro bezonas kunlaborantojn. Oni ofte diras, ke unu el la plej bonaj kunlaborantoj de la redaktoro estas la paperujo, kie devas esti sufiĉe da loko por la multaj neuzindaĵoj, kiujn ricevas la redaktoro de siaj legantoj.

Mi konfesu: Ĝis nun ne multaj manuskriptoj iris tien. Simple ĉar ne multaj manuskriptoj alvenis!

La redaktoro bezonas aliajn kunlaborantojn: La legantaro! Li dependas de vi - la legantoj - se li sukcesu en penso, krei legindan kaj vivan gazeton.

Ni simple povas diri: La legantoj ricevos tian gazeton, kian ili merit.

Tio ne signifas, ke la redaktoro ne bonvenigas kritikon. Tute kontraŭe!

La kontorfondaĵo.

Pli frue	kr. 710,85
Marit Delor	" 100,00
C.S.B.	" 30,00
R. Bugge-Paulsen	" 30,00
Elna Matland	" 20,00
	<u>kr. 890,85</u>

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

Nova ĉefredaktoro serĉata.

Nia tre kapabla kaj altkvalita ĉefredaktoro de NOVGA B. Elna Matland, krom ĉefredaktoro, ekde la 20-jara fidele laboris kaj la liga estraro laboris al li koregan dankon pro lia ofrena servado dum kvarjara jurocento.

Sed nun ni serĉas novan ĉefredaktoron! Li petus kontrolojn, kiuj estas pretaj transpreni la taskon, tuj anonci sin al la estraro. La estraro intencas intertempe direkti la gvidadon de la redaktado, la atiligado kaj la celo de la gazeto dum la venonta jaroj.

La liga estraro.

Korespondu!



Komercento, komercisto, naturaniko, artamanto, deziras korespondi kun norvegoj, kiuj bone scias Esperanton. Herbert Sauter, D-7417 URACH, Neue Str. 10, Germanujo.

40-jara instruisto deziras korespondi. Intereso: lingvoj kaj religioj. T. James Brennan, 23 Kathrose Drive, WILLOWDALE, Ontario, Kanado.

Brazila studento de teknika lernejo deziras korespondi. Mi kolektas bildkartojn, poŝtmarkojn, fotojn, revuojn, librojn, florojn (orkideojn, kaktajn k.t.p.). Roberto Blaz Martinez, R. Estácio de Sá 79, BR-18 100 SOROCABA S.P., Brazilo.

Sciigoj de NEL

Kotizoj por 1974. La landa kunveno en Haugesund devis iom plialtigi la kotizojn ekde 1974, ĉar ĉiuj prezoj konstante kreskas. La kluboj tial devas gustateme reguligi siajn proprajn kotizojn. Por 1974 la kluboj pagos al N.E.L.: por ordinara membro kr. 25, por familia membro kr. 10, por junula membro kr. 10 kaj por juna familia membro kr. 5.

U.E.A.-kotizoj 1974. Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto ESPERANTO ĉiuj individuaj Memoroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1974. Pagi al la loka Delegito aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118a, Oslo 6, postgirokonto 133.29. Ni rekomendas al ĉiuj membroj aboni la Jarlibron kaj la gazeton de U.E.A.. Ankaŭ U.E.A. devis iom plialtigi la kotizojn, kiuj estas: Membro-Jarlibro kr. 40,00, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton ESPERANTO) kr. 80,00, Membro-Subtenanto (ankaŭ ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 120,00.

59a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Hamburgo somere 1974. Aligiloj estas riceveblaj de la Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo 1.

La Oficeja Fondaĵo. La Liga Estraro kore dankas al ĉiuj bonkoraj donacintoj por tiu grava fondaĵo. Sed ni daŭre bezonas pliajn donacojn por teni la oficejon. Ĉiuj donacoj estas bonvenaj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj.

Taskotabelo por kluboj. - Novembro: La estraro sendas registritan informon al ĉiuj membroj, kiuj ne ekigis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas al ĉiuj klubanoj pagi la kotizon por la venonta jaro. La Delegito de U.E.A. kolektas la U.E.A.-kotizojn por la venonta jaro kaj varbas novaĵajn Individuajn Membrojn de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkvarono. Okazis unu estrarkunveno, kaj oni elsendis 2 cirkulerojn. Olav Reiersøl reprezentis N.E.L.n de la Universala Kongreso en Beogrado, la Norvega Registaro nomis R. Bugge-Paulsen reprezentanto, sed la nomigo ne atingis lin gustateme. La prelegvojaĝo de Albino Ciccanti okazis en Septembro. Elna Matland estas nomita nova prezidanto de la Faksekcio por Instruistoj. La presado de la revigita koresponda kurso malrapide progresas. Oni serĉas novan ĉefredaktoron de NORVEGA ESPERANTISTO.

La Liga Estraro.

Kiu volas helpi?

Blinda esperantisto en Oslo serĉas helpanton, kiu volus legi al li Esperanto-literaturon. Telefona al: Karl Balla, 60 75 79.

NUANNUVOJOS

Tio estas Tailandaj literoj. Ni komprenas eĉ ne ilin. Ni bezonas interlingvon!

FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO - NEFA

Kaldbakkstribben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek.



Fervojnovaĵo el la taggazeto „Il resto del carlino“

10 / 4 - 1973

Tradukita kaj sendita al la red. de Germano Gimelli, Bologna.

Ekveturos en junio nova trajno, kies nomo estas "ADRIATICO".

La unua trajno je granda komforto, la itala flag-trajno, ekstartos sur nia fervoja reto la 3-an de junio, sur la itinero Milano - Bologna - Ancona - Pescara - Bari. La itala F. S. decidis nomi ĝin "ADRIATICO". Ĝi estos la unua T.E. F. en ekskluziva servo sur la nacia reto. Ĝi konsistos el vagonoj similaj al tiuj utiligataj sur internaciaj T.E.E., ĝi entenos vagon-restoracion, kaj estos tirata de E.444, nome de la prestiĝa elektra lokomotivo serĉe nomata "Partaruga" (testudo), kapabla marŝi ĝis 200 km. po horo, kaj entenanta la plej modernajn sekurigajn instalaĵojn. "Adriatiko", kiu anstataŭas la aktualajn rapid-trajnojn 621 kaj 642, forveturos de Milano je la 12.10a, kaj venos al Bari je la 20.45a, de kie la forveturo okazos je la 10.10a, kaj ĝi atingos Milanon je la 19a. La servo okazos ĉiutage. La trajno konsistos el unua-klasaj vagonoj, kaj oni devos pagi la bileton kaj la suplementon kiu laŭ la distanco iras de minimume 650 liroj ĝis maksimume 3700 liroj. Al tiu ĉi unua komforta trajno aldoniĝos du aliaj la 30-an de septembro: unu sur la linio Milano - Napoli (transformo en T. E.E. de aktuala "Vesuvio"), kaj unu sur la linio Milano - Genova - Ventimiglia.

Klarigoj: T.E.E. = Internaciaj Trans-Europa-Expres.

E.444 = distinga nomo de la plej moderna kaj potenca itala elektra lokomotivo.

R.621 kaj R.624 = Distingaj numeroj de la rapid-

trajnoj nun trafikantaj respektive de Milano (je 12.12) al Bari (je 20.43), kaj de Bari (je 10.00) al Milano (je 19.00) "Vesuvio" ("Sago de la Vesuvo") = Rapidvagonaro (luksa) nun trafikanta.

EI „JERNBANEMANDEN“

EKSTERLANDAJ LABORISTOJ ĈE LA GERMANAJ FERVOJOJ: (D:B:)

21000 eksterlandaj laboristoj deĵoris en 1972 ĉe D.B., i.a. proks. 6000 turkoj, 5700 italoj, 2900 hispanoj, 3700 jugoslavoj kaj 700 grekoj.

Malnovaj numeroj de
NORVEGA ESPERANTISTO.

Malnovaj numeroj de
NORVEGA ESPERANTISTO.

Nia alvoko sur la frontpaĝo de NORVEGA ESPERANTISTO n-ro 3/1973 ĝis nun ne donis rezultatojn. Ni petas vin relegi tiun alvokon kaj kontroli ĉu vi povas havigi al ni iujn el la mankantaj numeroj.

Dankon!

C.S.-B.

Norvega Kroniko

Oslo

Klubkunveno 4.9.1973 en la fizika domo en la universitato, Blindern. La prezidentino Pepita de Caspary deziris bonvenon al nova laborsezono. La itala pastro Albino Ciccanti parolis pri "Franciscus el Assisi" - kaj montris lumbildojn de Assisi - de la urbo, preĝejoj, baziliko k.t.p. En ejo en la plej centra parto de Oslo la klubo, en kunlaboro kun NEL kaj NEFA, aranĝis esperantan ekspozicion 4/9 - 10/9 1973, kaj John Berggreen preparolis ĝin kaj dankis la kunlaborantojn. Fine A. Ciccanti montris lumbildojn el Italio, kaj en humora maniero paroletis pri sia metodo propagandi Esperanton.

Klubkunveno 17.9.1973. La vicprezidanto Thor M. Carlsen bonvenigis. Unue okazis eksterordinara ĝenerala kunveno, gvidata de C. Støp-Bowitz, pri kotizoaltigo pro la plialtigo de kotizoj al N.E.L. kaj pro altigoj de klubaj elspezoj.

Poste L. Anjer rakontis pri la malnova kaj interesa urbo Dubrovnik, kie li restis kelkajn tagojn antaŭ la kongreso en Beogrado, kaj pri la vizito ĉe la delegito en Dubrovnik.

De la kongreso li rakontis pri la akceptado, - la kongresdokumentoj estis enmetitaj en bela skatoleto donita de Fiat -, pri la solena malfermo, dum kiu inter la esperantoparolantoj ankaŭ estis usona kulturataŝeo, kaj pri la diversaj fakaj kaj hobiaj kunvenoj, en kiuj partoprenis multaj speciale lertaj, kaj la diskuto estis tre objektiva. L. Anjer finis konkludante, ke ni devas dum la kongreso montri al la ekstera publiko - al la mondo - ke dum la kongreso efektive okazas io.

Fine Pepita de Caspary menciis la vizitojn de Albino Ciccanti en la gazetredakcioj, lernejoj k.t.p.

Raportis O.Kolbrek.

Sauda

Esperanta renkonto sur sur Haukeli-monto.

La estraro de la Okcidenta Distrikto, kiu ankaŭ portempe estas la estraro de Sauda Esperantoklubb, aranĝis esperantan kunvenon sur Haukeli-sater sabate kaj dimanĉe la 15an kaj 16an de septembro.

Proksimume 50 personoj vizitis la kunvenon. Ili alvenis de Trondheim, Bergen, Haugesund, Stavanger, Kristiansand, Odda kaj Sauda.

La kunveno komenciĝis sabatvespere per bongusta tagmanĝo kun posta amuza aranĝo: Al la lasta kontribuis anoj de la kluboj:

Kolorfilmo de Olav Tormodsen kun samtempa rakonto pri sia vojaĝo al la Esperantokongreso en Beogrado, filmo de Klara Bodarenko pri Esp. Kunveneto en Kristiansand, kaj pri antaŭa Esperantokunveno sur Haukelimonto. Muziko de Norman Birkeli, Kristian Sivertsen laŭlegis memverkitajn poemojn, oni dancis kaj kantis. La amuza vespero finiĝis je la meznoktaj horoj.

Dimanĉe de la 10a ĝis la 11a horo oni kunestis en la kela salono por pritrakti pli seriozajn klubaferojn. Elna Matland gvidis la kunvenon. Olav Andersen faris la enkondukan paroladon kiu temis pri kiel aranĝi bonajn klubkunvenojn. Post tiu ĉi enkonduko, kiu estis tre bona, kelkaj anoj de aliaj kluboj rakontis pri siaj klubkunvenoj. Cetere la partoprenantoj parolis ankaŭ pri aliaj aferoj.

Je la 11a horo la kunveno finiĝis, ĉar de tiam la tempo estis libera por ĝui eksterdome la belan veteron. La plimulto faris piediradon al la montaro, dum kelkaj kaptis la okazon trovi vakciniojn.

Je la 14a horo ni tagmanĝis, kaj kelkajn horojn poste ni ĉiuj ekveturis hejmen.

Entute bonsukcesa aranĝo.

A.Bj.

La Okuloj

Ĉiu fotografemulo scias, ke etgrajnaj plakoj kaj filmoj ebligas pli akrajn bildojn kaj pli grandajn kopiojn. La akreco de la okulo same dependas de la nombro de vidĉeloj. En la tiel nomata "flava makulo" la homa okulo havas sur kvadrato kun centonmilmetra latero 16-20 vidĉelojn, dum buteco havas cent. Tio signifas, ke tiu birdo (musvåk)



vidas kvinoble pli bone ol la homo.

Falko povas distingi senmovajn kolombojn je milmetra distanco, dum hundo apenaŭ vidas kurantan homon nur kvincentmetre for. La katoj bone vidas, kaj - kontraŭe al la hundoj, kiuj ne havas tiel akran vidkapablon - nur malofte blindiĝas. La simioj, same kiel la homoj, dependas de bonaj okuloj, ĉar la flaro ne estas bonega, kiel tiu de la hundo.



Korn Det man ser på marken, det man høster, er greno. Hvert enkelt korn er graino. Dette ordet brukes også om andre korn, altså f. eks. om korn på fotografisk film.

Plate. En vanlig plate heter plato. Den fotografiske plate heter plako. En tynn plate kan være en lameno, hvis den er meget tynn, kan det komme på tale å bruke ordet folio. En gramfonplate heter disko.

Skarp. Akra brukes både om kniv, stemme, syn, lukt, hjørne. Skarp lukt kan selvsagt også hete penetra odor. En skarp grense bør hete preciza limo, mens en skarp person er sagaca.

Side. I en bok er det paĝoj, siden av et hus er flanko. Man sier også at "afero havas plurajn flankojn". Men i geometrien har trekanter og firkanter laterojn.

Stille. Kvieta heter det når man vil si, at natten er stille, byen eller været er stille. Trankvila er stille i betydningen "rolig": trankvila morto, trankvila akvo - også trankvila nokto. Hvis en person er stille, dvs ikke sier noe, er han silenta, hvis han er stille, dvs ikke beveger seg, er han senmova. Et svar kan være stille, dvs lavmælt, og da heter det mallaŭta.

Syn. Et syn kan være det å se, vidado, evnen til å se, vidkapablo, eller det kan være noe man synes at man ser, en visjon, vizio.

Lukt. Den lukt man kjenner, er odor, det som gjør at man kjenner lukten, er flaro. Oni flaras floron, kiu bone odoras.

Ak.III.

Notetoj

La Kastelo Gresillon.

La Kultura Asocio de la Kastelo de Gresillon pasintjare alvokis la esperantistaron por konstruado de ĉambrego por prelegoj kaj kursoj.

La laborojn oni komencis, sed mankas materialo por garni la ĉambregon. Do: mankas la seĝoj, tabloj, aŭdio-vida ekipaĵo ktp.

La Asocio de denove alvokas vin, kaj donacojn sendu al kasisto, s-ro Cousse Maurice, II, Rue Alain de Rouge, 72300 Sable sur-Sarthe, Francujo.

Pasporta Servo.

estas la gastiga servo de TEJO. Se vi povas/deziras gastigi iun eksterlandan esperantiston, vin turnu al: PASPORTA SERVO, c/o Cash, 72 rue de Rennes, F-75006 Paris, kaj petu broŝuron. Tiu kostas 6 intern. respondkuponoj

Radio Roma

sendas programon ĉiun dimanĉon, inter 21.00 kaj 21.20 mezeŭropa tempo, je kilohercoj 11.800 - 9.710 kaj 7.275. La temoj estas "Novaĵoj el Italujo", "Leterkesto", "Kuriero de esperanto."

Pola Esperanto-Asocio

sendis al ni multobligitan leteron pri "ITINERO", kio estas sistemo de individua esperantoturismo en Pollando, kun malkara restado ĉe privataj esperantistoj.

Se tio vin interesas, vi skribu al ITINERO, P.o. kesto 16, PL-50-952 Wroclaw, Pollando.

Esperanto en televido

sed ne en Norvegujo. La aŭstria TV vizitis la Internacian Esperanto-Muzeon en Wien la 23an de Aŭgusto, por tie filmi scenojn por televizia serio "BILDUNG-KURZ-AKTUELL" (t.e. Klerigo-mallonga-aktuala).

Post salutado en Esperanto sekvas informoj pri la gramatiko de Esperanto kaj pri la ekspozici-materialo de IEMW. Je la fino de la prezentado oni diras kelkajn frazojn pri la celo kaj la stato de la Esperanto-movado.

La programon oni montros la 16-an de Oktobro 20.09 - 20.15.

Norsk Esperanto = Forbund

NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro: 100.30.

Kontoradresse: General Birchs-gate 30, Oslo. Tlf 69 14 39.

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30 - 16.30.

Turisma servo: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.32.

Esperantoforlaget a/s

ELDONEJO ESPERANTO A/S

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro: 100.31.

Kontoradresse: General Birchs-gate 30, Oslo. Tlf 69 14 39.

ĈEFDELEGITO

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6. Postgiro 133.29

REDAKCIO

Hans Amund Rosbach, Nergt. 37 c, 6500 Kristiansund N. Telefon 77 620

EKSPEDEJO

Boks 942, Oslo 1.

ØKONOMI-TRYKK, Postboks 24, 8001 BODØ